

ESPERANTO-LITERATURO

«ORIGINALOJ KAJ TRADUKOJ»



FERDINAND HIRT & SOHN / ESPERANTO-FAKO
LEIPZIG C I SALOMONSTRASSE 15



L. L. ZAMENHOF

ORIGINALA VERKARO

ANTAŬPAROLOJ


GAZET-
ARTIKOLOJ

TRAKTAĴOJ

PAROLADOJ

LETEROJ

POEMOJ



KOLEKTITAJ
KAJ ORDIGITAJ

DE

D-RO. JOH.
DIETTERLE
L. K.

ORIGINALA FORMATO: 23 × 15 cm

1929. 605 PAĜOJ

KUN 6 FAKSIMILAĴOJ KAJ PORTRETO DE L. L. ZAMENHOF

LUKSA TOLBIDAĴO: RM 15.—

EL LA ANTAŬPAROLO:

„... Se oni volas sufiĉe koni la kreinton de nia lingvo, liajn principojn, lian sentadon, lian celon, lian laboron kaj la historion de la tuta Esperanto-movado, oni nepre devas studadi la originalan verkaron de Zamenhof kaj ne nur liajn tradukojn. En la tradukoj li ja donas sian lingvon, sed cetere nur la pensojn de aliaj. En sia originala verkaro li donas siajn propajn pensojn.

Ĝi enhavas la tutan programon de lia vivo; ĝi montras lian grandan animon, lian idealismon, lian grandan laboremon kaj samtempe lian akuratecon, lian precizecon, lian konfidindecon ankaŭ en la plej bagatelaj aferoj, lian internan evoluadon de post la apero de lia unua broŝuro ĝis la fino de lia vivo.“

KION DIRAS LA KRITIKO?

„... Ĝi estas rimarkinda kolekto da antaŭparoloj, artikoloj, traktaĵoj, paroladoj, leteroj kaj poemoj. Grandaparte la enhavo de la libro venis el fontoj malfacile konsulteblaj, kaj multo neniam antaŭe estis presita. La volumo ĵetas lumon sur multajn fazojn de la nekonata historio de la komencaj tagoj de nia movado. *Ĝi staras unika — la plej granda verko el la tuta originala Esperanta literaturo. Ĉiu biblioteko, ĉiu grupo, ĉiu serioza Esperantisto, devus klopodi, se iel ajn eble, havigi al si tiun ĉefverkon.*“

The British Esperantist (Oktobro 1929).

„... En ĉi tiu libro la Esperantistaro ricevis ion, kio estos por ĉiu serioza ano de la E-movado la ne malhavebla helpilo por studado instrua kaj ĝuiga. Ĝi instruas tiel pri la ekstera kiel pri la interna historio de la movado, pri venkoj kaj malvenkoj, pri sukcesoj kaj malfacilaĵoj kaŭzitaj ofte pli multe de amikoj ol de malamikoj; ĝi instruas pri evoluo de nia lingvo, pri reform-projektoj el la unua periodo, montrantaj pli multe la malegoistan cedemon de Z. ol lingvan saĝecon de la proponintoj; ĝi instruas pri la reala mondo, en kiu laboris kaj suferis Z. pro sia idealo, en kiu li donis modelan ekzemplon de saĝa persisto kaj prudenta propagandmaniero; ĝi instruas pri laŭfakta praktikemo de vera idealisto. Kaj la libro ĝuigas; ĝi ne distras aŭ amuzas, sed kaptas la animon, ĉar ĝi malkaŝas la laborplenan vivadon de viro, kiu estis pioniro de vere homa kulturo, posedante kaj utiligante la fruktojn de civilizacia edukiteco laŭepoka... La kolekta laboro havigis al ni posedaĵon, al kiu resti parole kaj age fidela fariĝas nia devo! La libro estas monumento, pli daŭra ol ŝtono kaj fero, por Z., kiu restos la ‚Majstro‘ spite al lia kontraŭdiro!“

Germana Esperantisto (Oktobro 1929).

„Kun admiro kaj fiero en nia koro ni klinas la kapon antaŭ tiu grandioza verko, la trezoro Zamenhofa, la plej bela Esperanto-libro.“

Heroldo de Esperanto (1929 Nr. 39).

„... Jam tiuj antaŭparoloj havas tian gravecon, ke ni sentas nin feliĉaj posedi ilin nun publikigitaj kaj legeblaj por ĉiu. Ni konatiĝas kun la majstro, lia profunda lingvotalento kaj genia lingvosento. ... Paroli aŭ skribi pri la 3a parto (Traktaĵoj) signifus verki novan traktaĵon. ... Cetere por ni nun estas pli necese sekvi la fadenon de l' evoluo de niaj lingvo kaj movado, se ni relegas la netakseble multsignifajn vortojn de gvidinto-patro. ... D-ro Dietterle akiris grandan meriton prezentante al ni tian kolekton. Leteroj estas atestoj kaj dokumentoj personecaj, en kiuj ankrofirmo bazas volo, karaktero kaj amo de l' skribinto, ĉu en maniero diplomateca, ĉu en sindono naivehoma. Multpaĝa ĉapitro ne sufiĉus por ekspluati ĉiusence la manskribaĵojn de Zamenhof; sed la ĝenerala superrigardo kondukas al du konkludoj: En Zamenhof enkorpiĝis la homaranismo kaj la genieco de intuitiva lingvo-kreanto.“

Heroldo de Esperanto (1929 Nr. 43).

„... Kia riĉega trezoro de Zamenhofaj skribaĵoj! Kia vasta enrigardo en la batalojn, zorgojn, malsukcesojn, laboradojn, esperojn kaj nevenkeblan idealismon de tiu homo, kiu en sia tuteco nur per tiu ĉi verko la unuan fojon estas montrata al la mondo. ... *Se la esperantistaro ne legos tiun ĉi verkon, tiam ĝi ne meritos ĝin posedi! Sed tute egale, kiel estos ĝia akcepto, la verko havos ĉiam la famon, ke ĝi estas la unua granda scienca dokumentaro pri Zamenhof, tiel pri lia persono kiel pri lia verko.*“


Paul Bennemann, L. K., Leipzig (Aŭg. 1929).

„... Kvankam ĝis nun mi nur alvenis je la 200a paĝo, mi ne povas min deteni pli longe de esprimi de mia plej kora dankemeco por via grandioza laboro kaj de sinceraj gratuloj pri la plena sukceso de viaj klopodoj.

Eĉ por malnova Esperantisto kiel mi, la libro estas trezoro de la plej granda intereso kaj ĝojo kaj ĉiam kaj ĉie mi disvastigos scion pri la valoro de via libro. En unu vorto, ĝi estas vera monumento al la memoro de nia amata Majstro.“

J. Merchant, prezidanto de Internacia Centra Komitato (Aŭg. 29).

VERKOJ DE D-RO EDMOND PRIVAT



HISTORIO DE LA LINGVO ESPERANTO

Vol. I: Deveno kaj komenco: 1887—1900

Dua eldono. 1923. 74 paĝoj.
Kartonita Rm. 1.60
Luksa tolbindaĵo Rm. 2.50

Vol. II: La movado: 1900—1927

1927. 199 paĝoj.
Luksa tolbindaĵo Rm. 6.—

„La du libroj helpu la novajn generaciojn iom pli funde koni kaj kompreni kiel semiĝis kaj kreskis el tero unu el la plej mirindaj greneroj de l' homa penso.“ (El la Antaŭparolo)

TABELO DE ENHAVO

Vol. I: Antaŭparolo al la dua eldono / Antaŭparolo al la unua eldono / Esperanto kaj indo-eŭropaj lingvoj / La Esperanta vortaro / Zamenhof. Deveno de Esperanto / Aperoj de la „Unua Libro“ / Unua jaro. La „Dua Libro“ / Amerika Filozofia Societo kaj „Aldono al la Dua Libro“ / Nürnberg. Einstein. „La Esperantisto“ / La Ligo. Reforma agitado / „Lingvo Internacia“ en Upsala / Franca Societo. „L'Espérantiste“ / La influo de L. de Beaufront / Esperanto en Ruslando. Interna Ideo. La spirito de la lingvo.

Vol. II: Antaŭparolo / Disvastiĝo en Okcidento (1900—1903) / Uzo parola. Unua kongreso (1904—1905) / La Bulonja deklaro (1905) / Kongresaj diskutoj. Fondo de la Lingva Komitato (1905) / Fondo de Centra Oficejo (1906) / Dua kongreso en Genève. La Fakoj (1906) / La Kresko. Tria kongreso en Cambridge (1907) / La Delegacio (1907) / La rompo (1908) / Fondo de U. E. A. (1908) / Reorganizo de Lingva Komitato. Kvara kaj kvina kongresoj (1908—1909) / Transoceanoj (1906—1909) / La organiza batalado (1911—1913) / La 25-jara jubileo (1912) / Dum la milito (1914—1917) / Post la milito (1919—1921) / Instruado en lernejoj (1908—1921) / La kontrakto de Helsinko (1922) / Uzo en komerco. Venezia konferenco (1921 ĝis 1924) / La nova organizo. Amaskongresoj (1923—1924) / Ĉe la laboristoj (1921—1925) / Ĉe la Ligoj de Nacioj (1921—1924) / Uzo en radiofonio (1923—1925) / Uzo en Scienco kaj Tekniko (1925) / Internacia Laboroficejo. Universala Telegrafa Unio (1920—1925) / La „Someraj universitatoj“ (1925—1927) / Literaturo / Evoluo de la lingvo / Unueco kaj potenco de la lingvo.

K R I T I K O J :

„... La nuna ‚Historio‘ igas imagi grandiozan orkestron tutmondan, el kiu talenta estro Privat laŭbezzone ekorgenigas la voĉojn al historia simfonio pri la mondvenkanto Esperanto. Legante vi aŭdas kvazaŭ verkon de J. S. Bach: Science precize li teksas; genia rigardo kaptas ĉion nur esencan; poeta koro ekaŭdas profunden; stilisto-entuziasmulo kolorigas ĉefaĵojn imprese per ŝvelant-malplianta ĥorego. Gigante kreskas de paĝo al paĝo la templo, kiun ili konstruas, ili, la revokitaj de li adeptoj ĉiukontinentaj, ili konstruadas inter bruado kanona, sur mortlito, en nokto malluma, ĉe diplomataj tabloj, en hela lumo de internacia L. d. N, konstante, rebatite, rekreante, ĉiuj kun la fajrero en si de la lumo eterna, savonta la mondon: Sur firma bazo altiĝas la templo, sur unueca sento de bezono homara. Per tiu tutmonda akordo finiĝas la simfonio pri- kaj perlingva.“

Aŭstria Esperantisto (1927, Nr. 11).

„... Ni ne faru grandajn kaj elektitajn frazojn por laŭdi la libron kaj la verkiston. La nomo de la aŭtoro kaj la firmo de la eldonisto plene sufiĉas... Tiu nova libro de s-ro Privat estas vera kurso pri la Esperantomovado, kiun ĉiu samideano volos legi kaj eĉ studi.“

Belga Esperantisto (1927, Nr. 11).

„... is an inimitable and wonderful piece of writing, giving not a dreary mass of dates and insolated facts, but a clear view of the movement and its modern developments and tendencies, in 29 chapters, each a literary gem.“

The British Esperantist (1927, Nr. 272).

„... Estas vera plezuro legi tiun simplan, fluantan prozon, kaj revivi enpense la disvolviĝon de nia movado dum la ĵus pasintaj dudek-kvin jaroj. Se la unua volumo ĉefe parolis pri la naskiĝo kaj unuaj pioniroj de Esperanto, la nuna pli insistas pri la uzoj de Esperanto ĉe diversaj kampoj, pri ĝia socia graveco ...“

Esperanto (1928, Januaro).

„... Antaŭ ni etendiĝas larĝe la ĝenerala, kómuna kaj internacia evoluo de la esperantista vivo en 29 ĉapitroj. Manko de loko malpermesas detalan priparoladon de tiu ĉi majstra verko kronon meritanta ...“

Heroldo de Esperanto (1927, Nr. 43).

„... De la legado de nia historio oni ĉerpas grandan bonon, nia esperantisteco, se eble, plivigliĝas. Ni havas antaŭ ni la kuraĝan kaj heroan agadon de niaj plej fruaj pioniroj, ni vidas, kiajn barojn, kiajn danĝerojn la mondlingva ideo travenkis kaj tio donas al ni kuraĝon por plua batalado ...“

Kataluna Esperantisto (1927, Nr. 9/10).

„... Se grava estas la libro por ĉiu Esperantisto, kiu sin interesas por la historio de nia Esperanto, des pli grava ĝi estas por la propagandisto, kiu trovas ĉion sciindan kaj sciigindan en ĝi. Por ekzamenitoj ĉe ŝtataj kaj aliaj institucioj ĝi nepre necesa estas kiel neelĉerpebla fonto. Multon, kiun eĉ Esperantisto staranta meze en la ondiĝo de l'movado ne scias aŭ rememoras, kompilis en tre interesa kaj lerta stilo la verkinto. Pro la eleganta ekipo, kiu indas la enhavon, la verko estas ornamo por ĉiu biblioteko kaj ankaŭ necesa pliriĉigo. Do ne hezitu, mendu kaj — studu ĝin.“

Marto (1927, Oktobro).

VIVO DE ZAMENHOF

Kun portreto de
d-ro L. L. Zamenhof

1923. 109 paĝoj.

ENHAVO:

I: La Gentoj en Litva lando. / II: Infano en Bjalistok. / III: Gimnaziano en Varsovio. / IV: Studentaj jaroj. / V: Doktoro Esperanto. / VI: Idealista profeto. / VII: Homarano. / VIII: Kongresaj Paroladoj. / IX: Lingvisto. / X: Verkisto. / XI: Etika Pensulo. / XII: Homo ĉe Morto.

Kartonita Rm. 2.50; Bindita Rm. 3.50


„... La vivo de Zamenhof estas prezentata en dekdu ĉapitroj. La unua el ili parolas pri la diversaj gentoj de la litva lando, la sekvantaj ĉapitroj pri lia infanaĝo, la tempo de lia gimnazia studo kaj liaj studentaj jaroj en Moskvo kaj Varsovio. La kvina ĉapitro kun la superskribo „Doktoro Esperanto“ raportas pri la eldono de lia Unua Libro kaj la okazintaĵoj antaŭaj kaj postaj. Grandan parton de la libro okupas la ĉapitroj pri la universalaj kongresoj kaj la paroladoj de D-ro Zamenhof. La temoj de kelkaj ĉapitroj, ekzemple „Idealista profeto“, „Homarano“, „Etika pensulo“, klare montras al ni, ke la tuta verko ne estas simpla historio de Esperanto ĝis la morto de ĝia kreinto, sed detala priskribo de lia vivo, de liaj ideoj, idealoj kaj klopodoj. Profundan impreson faras la lasta ĉapitro, kiu rakontas pri la morto kaj enterigo de la Majstro. Pro la mondmilito la landlimoj estis fermitaj, kaj el la vasta rondo familia, kiu ĉiujare dum la kongresoj kolektiĝis ĉirkaŭ li, povis nur tre malmultaj ĉeesti lian enterigon kaj diri adiaŭon al li en la nomo de la esperantistaro.

Jam la konata nomo de la verkinto certe instigos multajn samideanojn, havigi al si la rekomendindan verkon, por atente tralegi ĝin.“

Tra la Literaturo (1923, Nr. 3).

„... Zamenhof kaj Edmond Privat. Jen du nomoj, kiuj tuj frapis mian atenton kaj igas min enprofundiĝi en ĉiujn liniojn dum la legado. La Majstro kaj lia fidela disciplo. La dua sekvis la vojon, montritan de la unua, kaj per tio li faras la plej belan devon, plenumas la plej idealan taskon por la bono de la tuta homaro. Kun sincera riverenco mi klinas la kapon antaŭ ili... Legu ĉi tiun verkon, kiu estas unu el la plej brilantaj gemoj de nia originala literaturo. Ĝian stilan perfektecon jam garantias la nomo de l'aŭtoro. Li ne bezonas recenzon, nek lia verko. Ĉiu Esperantisto legu kaj sekvu la Majstron!“

Literatura Mondo (1922, Nr. 1).



H. A. LUYKEN / DU ROMANOJ

PRO IŜTAR

Romano el la antikva Babela historio
1924. 304 paĝoj. Bindita Rm. 7.—

„... Vereco de la historieca fono, majstreca karakterizado de la personoj kaj eleganteco kaj brileco de stilo kaj lingvo envicigas la romanon en la unuan rangon. Ĝi estas efektive unu el la plej bonaj kaj plej valoraj esperantaj original-romanoj, kiuj ĝis nun ekzistas...“

Esperanto Triumfonta (1924, Nr. 211).

„... „Pro Iŝtar“: belega, interesiga romano originala, ĝi transportas la leganton en vere orientan atmosferon antikvan. La leganto vere kunvivas kaj kunsentas la multenombrajn okazintaĵojn orientajn! — En la persono de la aŭtoro ni salutu grandan literaturan talenton. Ne nur li posedas imagpovon senliman, sed li esprimas sin per stilo admirinda pro simpleco kaj perfekteco. Liaj frapoj fluas plej harmonie kaj plej klare! — — — Ĉiu Esperantisto, ĉiu esperantista societo devos ĝin posedi en sia biblioteko, ĉar modelo ĝi estas laŭ ĉiuj vidpunktoj.“

Belga Esperantisto (1926, Nr. 5).

„... La kvara granda romano de nia angla amiko Luyken sen kontraŭdiro estas lia plej bona verko. — — — Ĉi tiu libro estas la ĉefverko de Luyken, bonega laŭ ĉiuj vidpunktoj. Lia maniero allogi per sia Esperanta rakontado la plenan, senspiran atenton de siaj aŭskultantoj estas admirinda: ĉiuj vortoj kunmetitaj, ĉiuj frazoj, eĉ la plej originale uzataj, ŝajnas al ni malnovaj konatoj, tiel klare travideblaj, kaj nature komprenataj ili rekontas nin.

Sen dubo kaj hezito mi nomas la verkon „Pro Iŝtar“ inter la ĉefverkoj de nia tuta literaturo. Kiel literaturaĵo ĝi estus ornamo por ĉiu ajn lingvo, kiel specimeno de la lingvo Esperanto ĝi estas altrange klasika. Kaj junaj kaj maljunaj homoj legos ĝin kun avida intereso.“

La Espero (1924, Nr. 11).

STRANGA HEREDAĴO

Romano originale verkita. 1922. 320 paĝoj.
Broŝurita Rm. 5.50. Bindita Rm. 7.—

„... Sed neeble resumi tiun lerte aranĝitan historion. Komencinte legi ĝin, oni iras ĝis la fino, scivola pri la strangaj aventuroj, aŭ pri la sorto de l' personoj, aŭ pri la ama intrigo, kaj ne forlasas la libron antaŭ la lasta paĝo. Tio jam estas kvalito ĉe romano. Plie ĉi tiu estas verkita per flua, korekta stilo.

Ĉiu samideano ne ankoraŭ leginte la novan originalan romanon de s-ro Luyken do povas havigi al si kelkajn horojn da honesta distraĵo kaj ĝudona legado.“

Esperanto (1922, Nr. 10).

„... Mi legis preskaŭ tutajn noktojn kaj ne povis ĉesi antaŭ la fino.“

La Espero (1922, Nr. 10).

„Tre interesa nova produkto de unu el la unuaj originale en Esperanto verkintaj aŭtoroj. Kiu konas la jam antaŭe de tiu samideano eldonitaj verkoj tute ne miros, kiam ni rekomendas tiun novan libron al ĉies atento. La temo estas plej alloga kaj diversfaka; la stilo estas perfekta kaj la lingvo plej fundamenta.“

Belga Esperantisto (1922, Decembro).

„Modelstilan verkon, pritraktanta religiajn kaj socialajn demandojn, pacifismon, naciismon, komercistajn, teknikajn kaj artistajn demandojn, okultismon kaj spiritismon.

Aventuraj kaj detektivaj okazintaĵoj. La aŭtoro per sia flua stilo ĝojigos la legantojn.“

Arguso (1922, Nr. 1).


JEAN FORGE / DU ROMANOJ

SALTEGO TRANS JARMILOJ

Romano originale verkita.
1924. 192 paĝoj.
Bindita Rm. 5.—

„... Plastika kaj vigla stilo, facila komprenebleco, luda legebleco jen la plej fortaj flankoj de la verko. La aŭtoro akiris por si lingvaĵon, kiu vaks-mole konformiĝas al liaj pensoj, kiu estas frapante viva kaj sugestie impresa — ĝuste per sia simpleco kaj facileco.“

Literatura Mondo
(1924, Nr. 12).



„... Estas la dua verko kiun Jean Forge prezentas al la Esperantistaro. En sia unua (Abismoj) li provis pentri animajn abismojn... Lia nova verko estas fantazia romano. Profesoro konstruas aparaton, per kiu oni povas vojaĝi en la tempon estintan (oni memoru la 'tempomaŝinon' de Wells). Per tia aparato societo de dek personoj vojaĝas en la tempon de imperiestro Nero, inter la personoj de la romano 'Quo vadis?'. Ni akompanas la dek personojn al Romo, ni partoprenas iliajn aventurojn kun la antikvaj Romanoj, la renkontiĝon inter antikva kaj moderna kulturoj... **Estas interesa legaĵo, kiu certe trovos multajn ŝatantojn. La stilo estas facila,** la verkanto saĝe evitas la 'kreon' de novaj vortoj.“

Arbeiter-Esperantist (1924, Nr. 9).

ABISMOJ

Romano originale verkita. 1923. 150 paĝoj.
Broŝurita Rm. 3.—. Bindita Rm. 4.50

„... Post finlego de la romano la leganto ne povas tuj liberiĝi kaj enprofundiĝas en siajn pensojn. Li plektas plu la restintajn fadenojn de la romano kaj laŭ persona gusto finfinas ĝin.

Por rekomendi la verkon sufiĉas, ke mi citas laŭvorte la entuziasman kritikon de samideano, kiu ne povis formeti la libron, ĝis kiam li ne finlegis ĝin: Fine verko, kvazaŭ en patra lingvo, en kiu mi ne devis lukti kun lingvaj malfacilaĵoj kaj kies enhavo ĉenis min al la libro. Se mi estus riĉa, mi enmanigus la libron al ĉiu Esperantisto por konvinki lin, ke modernan verkon doni ne konsistas en tio, ke ni kripligu la lingvon per neologismoj ĝis nerekonebleco, sed en tio, ke la genio de la verkisto evidentiĝu en artista klareco.“

Literatura Mondo (1923, Nr. 7).

„... La lingvaĵo estas tre laŭdinda kaj de tiu vidpunkto la verko estas forte rekomendinda al ĉiu sperta aŭ spertiĝanta Esperantisto. La flueco kaj facileco de la stilo atingas altan nivelon kaj denove ni havas verkon ilustrantan la plenan taŭgecon de Esperanto por originalaj literaturaĵoj.“

The British Esperantist (1923, Nr. 8).

„... Ĉio en la libro estas laŭdinda kaj Abismoj estas valora riĉigo de nia originala romanaro.“

Esperanto (1923, Nr. 10).

AŬSTRALIO

LANDO KAJ POPOLO

Originale verkita de

A. Delsudo kaj Lauri Laiho

1927. 96 paĝoj. 31 ilustraĵoj, 1 landkarto
Luksa tolbindaĵo Rm. 6.50

ENHAVO: Ĉirkaŭ la kontinento. Trans la kontinento. Moroj kaj kutimoj. La sporto en la Aŭstralia vivo. Regado kaj politiko. Aferoj spiritaj. Diversaj notoj. Ŝancoj de enmigranto. Eltrovo kaj esploro. Historia evoluo. La indiĝenoj. Iom da statistiko. Indekso kun prononco.

KION DIRAS LA KRITIKO?

„... Se tiu ĉi oranĝaruĝa fanfaro ne vekas la esperantistaron el ĝia hieraŭeco, ĉiu penado proama estas perdata... Ĝi rekomendas sin mem, ne — ĝi entuziasmigas cerbon modernan, flamigas koron, kiu nur iom amas nian belan teron kaj la sunon eternan super ĝi. Enkonduku tiajn librojn en ĉiujn mezlernejojn kaj la generacio de morgaŭ estos konforma al la bezonoj de l' tempo moderna...“

Aŭstria Esperantisto (1927, Nr. 10).

„Tiu libro donas plej interesan kaj plej vivoplenan priskribon pri la Aŭstralia mondparto. La aŭtoroj per trafa lingvo raportas pri ĉiuj flankoj de la vivo, komerco kaj industrio en tiu regiono. Ĝi estas unu el la plej interesaj dokumentoj, kiujn ni posedas en nia lingvo. Kiu legis la verkon, bonege konas la vivkondiĉojn, kun iliaj rozaj kaj dornaj anguloj. La aŭtorojn ni gratulas pri ilia bestila produktaĵo kaj la eldonistojn ni danku pro la nova arta ellaboraĵo, kiun ili prezentas al ni.“


Belga Esperantisto (1927, Nr. 11).

„... Mi ne hontas konfesi, ke tiu libro instruis min dum unu horo pli funde ol miaj profesoroj de geografio kaj historio dum la tuta tempo de mia studado...“

Heroldo de Esperanto
(1927, Nr. 35).

„Jam de la eksteraĵo oni estas ravita. Trafoliante la libron oni havas la plej bonan impreson pro la vere tre interesaj ilustraĵoj (enestas 31 kaj 1 landkarto) kaj gravan instigon por legado. En bona flua Esp.-stilo la ambaŭ verkistoj enkondukas la leganton en ĝeneralan kaj specialan scion pri la kontinento ankoraŭ tre malmulte konata. Ĉiu trovas en la verko ion nekonatan interesan: geografo, historiisto, sportisto, politikisto, sciencisto ktp. La verko meritas rekomendon kaj legadon. Preso kaj ekipo estas unukvalita.“

Marto (1927, Nr. 30).



La Vendreda Klubo

Dekunu diversaj originalaj artikoloj verkitaj de la Vendredo-klubanoj en Leipzig. Kun unu portreto de d-ro A. Steche kaj kelkaj desegnaĵoj. 1921. 115 paĝoj. Broŝurita Rm. 2.40

De Prof. D-ro Joh. Dietterle, L. K.

Direktoro de la Esperanto Instituto por la Germana Respubliko

ENHAVO: Antaŭparolo — 1. **P. Bennemann**: La romantika verkisto E. T. A. Hoffmann kiel muzikisto — 2. **A. Degen**: Instruo per laboro — 3. **D-ro Joh. Dietterle**: Leibniz kiel „antaŭbatalinto por nia ideo“ de mondhelplingvo — eraro! — 4. **E. Franck**: Esperanto kaj la Frey-ligo — 5. **D-ro W. Lippmann**: Pri la lingvaj respondoj de Doktoro Zamenhof — 6. **A. Petzold**: La unuaj jaroj de Esperanto en Leipzig — 7. **H. Rössel**: Serioza laboro — 8. **D-ro E. Stucke**: Scienca teorio de Ostwald pri la koloroj — 9. **P. Wilhelmi**: Pri la insulo Korfu kaj la imperiestra kastelo Achilleion — 10. **E. Wunderlich**: La ŝtata Saksa Esperanto-biblioteko — 11. **A. Zealer**: Pri la Esperanto-movado en Britujo depost la fino de l'mondmilito — Aldono (D-ro Dietterle): Biografiaj notoj pri D-ro Steche kaj resumo pri liaj poresperantaj artikoloj kaj alparoladoj.

„... Tre diversspecaj estas la temoj donantaj fakte, al kelkiu ion. Sed ĉiuj artikoloj estas zorgeme ellaboritaj kaj nepre legindaj. Tre bona estas la stilo de ĉiuj artikoloj kaj pura estas la lingvo, kies vivantecon ni spirite perceptas kaj sentas. La libro rekomendas sin mem per sia boneco laŭ enhavo kaj stilo.“ Esperanto Triumfonta (1921, Nr. 51).

„... La modela stilo, la riĉa enhavo, la fortaj ondoj de hela klereco kaj sincera kulturemo, kiuj trafluas la tutan verkon, ĉio forte atestas la grandajn lertecon kaj idealemon de la klubanoj. Por malnova esperantisto la legado de tiu ĉi libro estas granda ĝojo.“ N. Oekland-Torvastad.

Ferdinand Raimund / La Malŝparulo

Originala sorĉfabelo en tri aktoj. El la germana lingvo tradukita de Franz Zwach. Kongresdramo de la XVIa. 1924. 97 paĝoj. Kun kolora kovrilo. Broŝurita Rm. 2.—

„Disputas pri feliĉ' sen fin' Stultigas reciproke sin
La homoj inter si. kaj mem ne scias pli...“

Rememoro el nia infanaĝo, kiam ankoraŭ mia patro kantetis hejme la naivajn melodiojn de la „Malŝparulo“, tiel sukcese ludita dum la Viena Esperanto-kongreso. La tutan verketon envolvas ia naiva, malnova nebulo reportante nin al tempoj pasintaj, kiam la homoj bezonis tiajn sorĉfabelojn kun iom da dramo, iom da vero, iom da simbolo, iom da bonhumoro kaj kun bona fino. La malnovmoda, vere vienana muzikakompano, la lerte pentritaj figuroj, la montro de sorta puno al la malbonuloj kaj sorta rekompenco al la bonuloj donas specialan ĉarmon al la teatraĵeto. La libro certe estas agrabla kaj facila legaĵo. Pri la lerteco ĝenerala de la tradukinto atestu tiu ĉi parto:

Ke pro gut' da vinbersuko Ke ĉapelon li kun buko
Hom' kun tia boneduko Interŝanĝas kun peruko:
Povas perdi el la nuko Estas granda menskaduko.
Tiom de la cerbomuko

Kiuj ŝatas kelkfoje forlasi la nunan ofte malesperigan materialan mondon kaj reiri al pli simplaj problemoj, kiuj ŝatas la fabelojn prezentantajn al la legantoj ofte profundajn verojn, tiuj ĉiam plezure legos la prozajn kaj poeziajn paĝojn de la „Malŝparulo“. Por ili la tempo ne estos malŝparado, ili trovos almenaŭ momentan kontentiĝon kaj:

„Kontento ja estas plej bona balzam'.“ Literatura Mondo (1924, Nr. 10).

PALACO DE DANGERO

⟨RAKONTO PRI MADAME LA POMPADOUR⟩
DE
MABEL WAGNALLS

Tradukis el la angla originalo

EDWARD S. PAYSON

Honora prezidanto de la Esperanto Asocio de Nordameriko

1926. 206 paĝoj. Luksa tolbindaĵo Rm. 6.—

KION DIRAS LA KRITIKO?


„... Emocia amrakonto sur historia fono. Lerte elpensita romano, belstile kaj interese skribita kaj bone tradukita. La amrakonto: Juna, fajra nobelo amas la Pompadour, la favoritinon de reĝo Louis XV, sed lin amas simpla sed talenta knabino-orfino edukita en monaĥinejo. Post multaj aventuroj fine la juna grafo edzinigas la orfinon, kiun li ekamis sincere. — La historia fono: famaj kasteloj de Versailles kaj Bellevue, Parizo, Louis XV, Pompadour, kortego, nobeloj, pastroj, belaj virinoj, lakeoj, paĝoj. Aventuroj, intrigoj, festoj, gojoj, suferoj ... sed la fino estas bona.

La romano respegulas la varian vivon je la tiama tempo, vivon de lukso kaj diboĉado ĉe la kortego, dum la popolo malsatas. Legante ĝin, oni bone komprenas, ke ĉio ĉi fine devis konduki al revolucio.

La libro estas valora kaj bela, la desegnaĵo de l'kovrilo tre arta kaj certe ĉi tiu romano kuŝos sur la naskiĝtaga aŭ kristnaska tablo de multaj gesamideanoj.

Heroldo de Esperanto (1926, Nr. 49).

„... Du principoj regas la mondon: malsato kaj amo. Domage por ni pli regas malsato ol amo; sed jam pli kaj pli la amo forprenas de la malsato agadkampon. En la teruraj tempoj — 33 jaroj antaŭ la franca revolucio — malsatado de kampuloj estis tia ĉiutagaĵo, ke por nobeluloj estis nur kaŭzo de amuzo la komuniko, ke homo mortis pro malsato. La libro majstre pentras la malŝparemon de la Pompadour, la kruelecon de Louis XVa, la malplenecon de kortegaj plezuroj, kaj tra la rakonto fantomas la ombro de la Bastille, la terura malliberejo, en kies subteraĵoj politike nefidindaj personoj vivantaj estas enmasonitaj. — La stilo de la libro estas tre ĉarma, la traduko preciza, tial la legado estas plezuro. **La luksa**



aranĝo faras la libron ornamaĵo de ĉiu biblioteko.

La Socialisto (1926, Nr. 10).

„We thoroughly enjoyed this historical romance, reading it from cover to cover at a sitting, and extend our cordial sympathy to anyone too blasé to do likewise. Using Madame Pompadour and Louis XV as her central figures, with a delightful love story in the background, the authoress gives us an excellent picture of the period, combining plenty of colour with historical accuracy. — In conjunction with the tasteful binding it will make **an ideal gift book.**“

International Language (1926, Oktober).

„Bone rakontita kaj dramee forta, ĉi tiu romano ree spiras la spiriton de Dumas kaj de Bulwer-Lytton.“

Oregonian, Portland, Oregon.

„Ne multaj grupoj da personoj estas uzitaj pli ofte en fikcio ol la anoj de la kortego de Louis XVa, tamen malmultaj penoj, fari romanon el iliaj vivoj, estas tiel tute ravaj, kiel ĉi tiu rakonto. Ĉirkaŭ la heroo kaj heroino Fraŭlino Wagnalls verkis rakonton, kiu havas la povon, tenadi la intereson, de la leganto de la komenco ĝis la fino. Ĝi estas plena de drameca movado kaj havas ĉarman stilon.“

New York Press.

„Palaco de Dangers estas absolute homa rakonto, kaj tiel bone verkita, ke la intereso ne malfortiĝas.“

The Review of Reviews, New York.

„La aŭtoro, Fraŭlino Wagnalls, donas belegan bildon de la grandioza kortego kaj de la cirkonstancoj, kiuj fine kaŭzis la revolucion.“

Globe Democrat, St. Louis, Mo.

INTERNACIA MONDLITERATURO

SUBMETATA AL LA GVIDADO DE S-RO
PROF. D-RO JOH. DIETTERLE, L. K.
Direktoro de la Esperanto-Instituto
por la Germana Respubliko

Ĉiu volumo, kartonita en arta kovrilo, ampleksas 64—80 paĝojn; formato 13×19,2 cm. Prezo po volumo: Rm. 1.60 (duobla volumo: Rm. 2.50). Kvin diversaj volumoj laŭ elekto: Rm. 6.—. Kvin sinsekvaj volumoj (1—5 kpt.) tole binditaj po Rm. 6.—.

Ĝis nun aperis 21 volumoj. — La kolekto estas daŭrigata.

„... Kun vera ĝojo oni devas saluti tiun ĉi serion. Ni urĝe bezonas verajn librojn esperantajn, ne originalaĵojn, sed tradukojn de la plej bonaj libroj el ĉiuj lingvoj. Se ni esperu, ke Esperanto havos signifon kiel internacia lingvo, ni devas en tiu lingvo posedi tradukojn de la mondfamaj verkistoj, ne nur de la longe mortintaj verkistoj sed ankaŭ de la vivantaj. En unua loko venu la beletristikaj verkoj, en dua loko la popularsciencaj kaj en tria loko la pure sciencaj. Por ke ni sukcesos havi tian librotrezoron tre utilan por la movado, ne taŭgas, ke ni agu ĉiu por si mem, sed *ni grupigu ĉirkaŭ tiu entrepreno kiu plej bone povas realigi la postulon*. La eldonejo estas por tiu celo la plej taŭga laŭ niaj scioj.“ „La Espero“ (1922, Nr. 89).

Volumo 1. **Goethe, J. W. von, Hermano kaj Doroteo.** Eposo idilia. El la germana originalo tradukis *Benno Küster*. Dua eldono kun antaŭparolo de Prof. D-ro *Dietterle*. 1922. 77 paĝoj.

„... La unua volumo de Internacia Mondliteraturo prezentas poezian romanon de Goethe, unu el la plej artaj kreaĵoj de l'granda germano. La traduko valoras tiun de grekaj aŭ latinaj epozoj jam esperantigitaj kaj donas al negermano fidelan rebrilon de l'originalo.“ Esperanto-Genevo.

Volumo 2. **Niemojewski, A., Legendoj.** El la pola originalo tradukis *Bronisław Kuhl*. Kun antaŭparolo de *Antoni Grabowski*. Dua eldono. 1923. 74 paĝoj.

Enhavo: Antaŭparolo. Tentistoj. Majlaĥ. Admono. Du disciploj.
„... La legendoj de Niemojewski apartenas al la libroj, kiujn oni neniam forgesas kaj de kiuj oni neniam volas disiĝi. La traduko estas eminente bonstila, vigla kaj konciza.“ Literatura Mondo.

Volumo 3. **Turgenev, I. S., Elektitaj Noveloj.** El la rusa originalo tradukis *A. Mexin*. 1923. 81 paĝoj.

Enhavo: Antaŭparolo. Mumu. Beĵin-Herbejo. Poemetoj en prozo.
La tradukintino elektis por tiu volumo rakontojn, kiuj apartenas al diversaj periodoj de la verkado de Turgenev. „Mumu“ estas laŭ eldiro de la fama angla verkisto Carlyle la plej kortuŝa el ĉiuj rakontoj, kiujn li iam legis. La bela rakonto „Beĵin-Herbejo“ estas kvazaŭ kadrumita de admirinda naturpriskribo, kaj „Poemetoj en prozo“ sonas kiel fina akordo de tiu nepre rekomendinda volumo.

Volumo 4. **Raabe, Wilhelm, La Nigra Galero.** El la germana originalo trad. Prof. D-ro *Fritz Wicke*. Dua eldono. 1922. 64 paĝoj.

„... La jenan rakonton oni legos kun pli kaj pli streĉa atento, ĉar ĝia amintrigo estas lerte kunmiksita kun la plej mirigaj kaj timigaj okazoj de la lukto, dum la lastaj jaroj de l'deksesa jarcento, inter Hispanoj posedantaj Flandrujon kaj Nederlandanoj, ĉefe la partianoj konataj sub la nomo „Geŭzoj“.“

Esperanto-Genevo.

Volumo 5. **Hildebrand, El la „Camera Obscura“.** El la hollanda originalo tradukis *H. C. Mees*. 1923. 64 paĝoj.

Enhavo: Antaŭparolo. Anĉjo la ĉasisto. La maljunulejano rakontas sian historion. Malnova konato.

„... Sed ne nur la enhavo estas tre leginda, ankaŭ la tuta maniero, kiel la okazaĵoj estas prezentataj, estas tre lerta kaj por la leganto tre agrabla...“
Tra la Literaturo.

Volumo 6. **Irving, Washington, El la skizlibro.** El la angla originalo tradukis *H. L. Elvin*. 1924. 64 paĝoj.

Enhavo: Antaŭparolo. Rip van Winkle. La fierajo de la vilaĝo. La fantoma fianĉo. La kampara preĝejo.

Jen veraj perloj el la amerika-angla literaturo. La tradukanto prezentas al ni la plej konatajn rakontojn de Irving el lia „Sketchbook“. Li komencas la bonegan kolekton per la ĉarma novelo „Rip van Winkle“ kaj plene sukcesas respeguligi la tutan ĉarmon de la interesaj originaloj per lerta kaj modela traduko!

Volumo 7. **Chamisso, Adelberto de, La mirinda historio de Petro Schlemihl.** El la germana originalo tradukis *Eugen Wüster*. 1922. 84 paĝoj.

„... Kiu ne ankoraŭ legis, aŭ en la originalo, aŭ en unu el la multaj alilingvaj tradukoj, la fantazian rakonton pri la homo perdinta sian ombron, tiu plezuron certan trovos en la legado de l'esperanta transskribo; kaj kiu jam konas la historion, tiu ankaŭ legu la tradukon de s-ro Wüster, tiel fidelan, precizan, lerte uzatan ĉiujn eblecojn de nia lingvo.“
Esperanto-Genevo.

Volumo 8. **Stamatov, G. P., Nuntempaj Rakontoj.** El la bulgara originalo tradukis *Ivan H. Krestanoff*. 1922. 80 paĝoj.

Enhavo: Vilao apud la maro. En la tombejo. La estinteco. Pri unu anguleto de l' animo. Du talentoj.

„... Ĉiu el la kvin rakontoj havas apartan originalecon kaj lasas neforgesindan impreson en la menson de l'leginto. Tiu ĉi estas tiel interesata de l'rapida sinsekvo de l'agoj aŭ diroj, li tiel facile trakuras la fluan, vivan stilon de la tradukinto, ke baldaŭ li ne konscias legi paĝojn de balkana aŭtoro en fremda lingvo.“
Esperanto-Genevo.

Volumo 9. **Ŝalom-Aleĥem, Perec, Hebreaj Rakontoj.** El la hebreaj originaloj tradukis *Is. Muĉnik*. 1923. 78 paĝoj.

Enhavo: Antaŭparolo. **Ŝalom-Aleĥem:** La miraklo de „Hoŝano rabo“. Ne estas feliĉo. Rabĉik. La trezoro. Legendo pri la kreado de l'virino. Aforismoj. **Perec:** Kio estas animo (Historio de mia juneco). Fratinoj. Pidjon ŝebuim (el la hebrea vivo en Polujo). Oni ree ekuzis la pendigilon. Hormuz kaj Aĥrimon.

„... Ŝalom Aleĥem estas popola humoristo, kiu ridas pri siaj samnaciانوj ne mokeme sed helpeme, tiel, ke li estas legata en ĉiu domo kaj de ĉiu familio. Kaj Perec estas moralisto, kies celo estas prezenti al la mondo la veran judan karakteron, kiun multaj homoj ne komprenas aŭ ne volas kompreni. La lerta tradukisto prezentas la historietojn — el la popola juda lingvo — en flua esperanta stilo.“

Volumo 10. **Puŝkin, A. S., Tri Noveloj.** El la rusa originalo tradukis D-ro *Andreo Fiŝer*. 1923. 67 paĝoj.

Enhavo: Antaŭparolo. Pikreĝino. Neĝblovado. La pafo.

„... Puŝkin estas unu el la plej meritplenaj kreintoj de la nuntempa rusa literatura lingvo. La konata tradukinto prezentas tri elektitajn novelojn en majstra esperanto-stilo. La enhavo de ĉiu novelo estas tiom vivoplena kaj interesa, ke la leganto remetos la volumon en la libroŝrankon nur post finlegado de la tuta enhavo.“

Volumo 11-12. **Ariŝima, T., Deklaracio.** Romano. El la japana originalo tradukis *T. Tooguu*. 1924. 125 paĝoj.

„... Lia novelo ‚Deklaracio‘ estas verkita en formo de leteroj interŝanĝitaj inter du instruitaj kaj kleraj junuloj. Ĝi montras, kiel japanaj junuloj pensas, suferas kaj agas kaj havas speciale grandan allogon por ni eŭropanoj. Krome la esperantlingva apero de la libro de Ariŝima estas atentinda okazintaĵo, ĉar ĝi estas la unua, sufiĉe ampleksa, Esperanta tradukaĵo, aperinta en eŭropa eldonejo. — Kia pensprofundeco lumas el la leteroj! Kiom la eŭropa studentaro povas lerni el la vortoj de la juna licenciato! Kia alta vivkompreno! Ĉu Orientazio kaj Eŭropo iam spirite kunfandiĝos? Estas demando, kies respondo restos duba. Por ni Esperantistoj estas netakseble granda avantaĝo, ke ni per nia lingvo enpenetras en la spiriton de malsamrasanoj el landoj malproksimaj. — La stilo de l' tradukinto montras originalecon, kiu efikas kvazaŭ ĉarmiga voĉo de solene parolanta predikisto. Legante ni sentas, ke la ekstrema Oriento nin tuŝas.“

Germana Esperantisto.

Volumo 13. **Poe, Edgar Allen, Ses Noveloj** el „Rakontoj de Mistero kaj Imago“. El la angla originalo tradukis *A. Frank Milward*. 1924. 80 paĝoj.

Enhavo: Antaŭparolo. Liĝeja. La ovala portreto. La barelo da Amontilado. Kelkaj vortoj kun mumio. La homo, kiu troviĝis eluzita. La silento — Fabelo.

„... Ĉu vi jam legis la novelojn en la angla originalo? Nu, tiam prenu tiun tradukon, komparu kaj ĝoju pri la perfekta traduko en Esperanto! Ĉu vi ne konas Allen Poe? Nu, ne hezitu tuj legi tiujn ĉarmajn, emociigintajn kaj misterajn novelojn — la originalo ne parolas pli plastikan lingvon!“

Volumo 14. **Balzac, Honoré de, La firmao de la kato, kiu pilkludas.** El la franca originalo tradukis *Paul Benoit*. 1924. 75 paĝoj.

„... Balzac kun sia impresoriĉa stilo postulas la tradukon per lingva temperamento, kiu obeas al la takto de lia sangobato. Kaj tian tradukon liveris al ni s-ro profesoro Benoit. Li imitas kun granda zorgo la nekompareblan stilon de la aŭtoro, konservante la gracian elegantecon, kiu interligas lin kun lia popolo.

Tiamaniere Balzac fariĝis nun Esperanto-verkisto. Neniu alia franca rakontisto meritas tiom, kiom Balzac, esti legata de plej vastaj rondoj.“

Volumo 15. **Doroŝeviĉ, Vlas, Orientaj Fabeloj.** El la rusa originalo tradukis *Nikolao Hohlov*. 1924. 64 paĝoj.

Enhavo: Antaŭparolo. La fabelo pri fabelo. La kalifo kaj la krimulino. Kiel de Hasan falis la pantolono. La malĝuste trafitaj kalkanoj. Historio de porko.

„En la Orientaj Fabeloj de Vlas Doroŝeviĉ, vi legos humorajn trafajn satirojn, vestitajn per la vualo de orienta kostumo. Tiel ili povis aperi kaj vipi la rusan caran reĝimon, mokante la nekompreneman cenzuron. La kvar fabeloj tradukataj de N. Hohlov estas en tia speco veraj ĉefverketoj, kaj la esperantigo estas tiom taŭga, kiom la originala teksto estas sprita.“ Esperanto-Genevo.

Volumo 16. **Sienkiewicz, Henryk, Noveloj.** El la pola originalo tradukis *Lidja Zamenhof*. 1925. 64 paĝoj.

Enhavo: Henryk Sienkiewicz. Lux in tenebris lucet. La maljuna servisto. Dioklo. Estu benita (Hinda legendo). La anĝelo.

„La elektitaj rakontoj estas belegaj. Oni malfacile povus diri, kiu el ili estas la plej ŝatinda. Sen preseraroj, gramatike korekta, la nova libro tiel zorge eldonita de eldonejo Hirt, meritas lokon en la biblioteko de ĉiu esperantisto.“

Kataluna Esperantisto.

Volumo 17. **Strindberg, August, Insulo de feliĉuloj.** El la sveda originalo tradukis *Oskar Frode*. 1926. 69 paĝoj.

„Ĝi estas la libro, kies valoron pravas reputacio de la mondfama verkisto. Ĉi tiu libro apartenas al tiuj, kiujn devus tralegi ĉiu nuntempulo. La evoluo de la homara komunumo estas pristudata en balenampleksaj libroj kaj lumigata el ĉiuj vidpunktoj. Oni tre facile perdiĝas en tiu labirinto de diversaj ismoj. La supra novelo simplarakonte, sen diskutoj pri abstraktaĵoj, tre interese prezentas la plej aktualan socian problemon de la hodiaŭo. Estas superflue diri ion pli.“ Konkordo.

Volumo 18. **Bertrana, Prudenci, Barbaraj prozaĵoj.** El la kataluna originalo tradukis *Jaume Grau Casas*. 1926. 64 paĝoj.

Enhavo: Antaŭparolo. La forlasita vojo. La kabanoj de la karbfaristoj. La kamenoj de la gastejoj. Josafat.

„P. Bertrana, forta kataluna prozisto, pritraktis kun granda lerteco precipe kamparaja temoj. Fervora ĉasisto kaj ekskursamanto li havis okazon profunde esplori la animon de plej humilaj kamparanoj. El la ĉefa verko ‚Barbaraj Prozaĵoj‘ tiel nomitaj pro ilia krudeca priskribo de la vivo disvolviĝanta en plena naturo, ni povas ĉi tie legi esperante tradukitaj tri el la plej karakterizaj noveloj.“

Volumo 19. **Ŝimunoviĉ, Dinko, Ano de l' ringludo.** El la kroata originalo tradukis *Fran Janjiĉ*. 1926. 86 paĝoj.

„En ‚Ano de l' Ringludo‘ la verkisto majstre priskribas la regionon apud la rivero Cetina, en kiu regiono ĉiujare okazas la Ringludo. Ni vidas la kurejon, la popolamason, la partoprenantojn en ili kaj belegaj kaj riĉaj antikvaj kostumoj, ĉiu akompanata de sia junulo (paĝio), same riĉe vestita, la ĉevalojn ornamitajn per oraj kaj arĝentaj ornamaĵoj, ni kunsentas la entuziasmon de la ĉeestantoj. Estas vera ĝojo por la tutmonda Esperantistaro havi okazon ekkoni tian originalan verkon.“ Holanda Esperantisto.

Volumo 20. **Eekhoud, Georges, Servokapabla! Marcus Tybout.** El la flandra (franclingva) originalo trad. *Léon Bergiers*. 1927. 71 paĝoj.

„... Mi timis, ke legante la verkon, mi seniluziiĝos, ke ĝi ne povas satigi la esperigon de la antaŭparolaj laŭdoj. Mi trompiĝis. ‚Servokapabla‘ estas kortuŝa, emociiga, altkvalite realista verko, lingvoriĉe verkita kaj tradukita, pruvante la lertecon de nia juna samideano Bergiers por Esperanto kaj por literaturo. Gratulon al ĉiuj partoprenintaj la aperigon de tiu ĝuiga nova volumo de la ‚Internacia Mondliteraturo‘.“ Kataluna Esperantisto.

Volumo 21. **Sadoveanu, Mihail, Nobela peko.** El la rumana originalo tradukis *Tiberio Morariu*. 1929. 63 paĝoj.

Enhavo: Antaŭparolo. Nobela peko. En arbaro Petriŝor. La sciigantoj.

„... La ĉefa rakonto ‚Nobela peko‘ estas interesa kaj majstra drama priskribo pri la rumana marĉa regiono kaj ĝia malnovepoka nobelaro kaj popolanoj. La skizo ‚En Arbaro Petriŝor‘ vere estas perlo en la literatura ĝardeno. Ĝi temas pri mortevundita kapreolino, kiu forkuras de la ĉasistoj, trovas lokon malvarman inter betuloj, en alta herbaro, kie kuŝiĝi. Kaj ĉi tie sub la bukaro de la betuloj kun la blankaj trunkoj ŝi en silento atendas la morton kaj trovas ĝin. Mi volas diri, ke eĉ nur pro tiu belega, kortuŝa skizeto oni devas havigi al si la libron. Oni ĝojas, kiam oni pere de Esperanto konatiĝas kun tiaj literaturaj trezoroj.“

Svenska Esperanto Tidningen.

PAUL BENNEMANN

Membro de la Esperantista Lingva Komitato. Instruisto kaj Ekzamenkomisario
ĉe la Esperanto Instituto por la Germana Respubliko

INTERNACIA LEGOLIBRO TRA LA MONDO

UNUA PARTO: POR KOMENCANTOJ KUN MULTAJ BILDOJ KAJ MUZIKNOTOJ
4a ELDONO. 1929. 96 PAĜOJ. KARTONITA RM 1.50

Enhavo: Antaŭparolo. — 1-a ĉapitro: Proverboj el 23 lingvoj.
2-a ĉapitro: Aforismoj.

3-a ĉapitro: Interesaĵoj el la vivo kaj sciencoj: Deveno de la terpomoj Kondamno de l' milito — Sta. Helena — La „Morta Maro“ — Oro en la marakvo — La plej altaj montoj — Flugado de la suno — Pri la fino de l' mondo — Prahomoj vivantaj — Miraklo de hinda fakiro — Konservoj de vivantaj fiŝoj — Piramidoj kaj obeliskoj — Grandegaj domoj — La unuaj fervojoj kaj gaslampoj — La karboprovizoj de la tero — Gravaj eltrovaĵoj — La komponisto Rossini ktp.

4-a ĉapitro: Fabeloj, fabeloj kaj rakontoj. La cedro (Goethe) — La histriko (Schopenhauer) — Parabolo (Rückert) — La matenruĝo (Herder) — La pento (Krummacher) — La rozarbo (Bennemann) — Le ĉemizeto de l' mortinto (Germana fabelo) — La rozo (Germana fabelo) — Kiel la diablo kreis la negron (Brazila fabelo) — La elefanto kaj la kaprino (Negra fabelo) — La senditoj de l' morto (Germana fabelo) — La akvo de l' vino (Germana fabelo) ktp.

5-a ĉapitro: Ŝercaĵoj. — 6-a ĉapitro: Amuzaĵoj kaj kantoj por liberaj horoj.

DUA PARTO: POR PROGRESINTOJ KUN ALDONO DE 4 KOMPONAĴOJ
(POR KANTO KAJ FORTEPIANO). 1922. 144 PAĜOJ. KARTONITA RM 2.20

Enhavo: Antaŭparolo. — 1-a ĉapitro: Paroloj de l' saĝo.

2-a ĉapitro: El la mondliteraturo: Ĥinaj poetoj — El araba poezio — El la Korano — Kantoj de Hafis — Rabin-dranath Tagore: La ĝardenisto — Shakespeare — Meyrink — Leonardo da Vinci — E. de Amicis — Nicolas Beets — Averĉenko — Tolstoj kaj aliaj eminentaj verkistoj de ĉiuj nacioj.

3-a ĉapitro: El la vivo, la artoj kaj sciencoj: Originalaj artikoloj ekz. pri La moderna pentrarto — La vivo kaj verkaro de R. Wagner — La teorio de Einstein — Ekskursoj al senfinaĵoj — Nova argumentado por la teoremo de Pythagoras — Kiel oni rigardu bildojn ktp.

4-a ĉapitro: Por vesperaj horoj: Historiaj anekdotoj, ŝercaĵoj, problemoj kaj enigmoj.

Aldono: 4 komponaĵoj de Mozart, Wagner kaj de 2 vivantaj komponistoj (laŭ manuskriptoj ne presitaj) por unu voĉo kun akompano de fortepiano.

„... La dua parto de la ‚Tra la mondo‘ plenumas la promesojn dedukteblajn de la kvalitoj de l' unua. Ambaŭ volumoj formas krestomation de neordinara intereso kaj valoro. Ni devas admiri, ke tia ampleksa verko, kiel ‚Tra la mondo‘ estas tiom zorge preparita; multon ni ŝuldas al la klopodado de sinjoro Bennemann; en ĉiu serioza esperantista librokolekto ‚Tra la mondo‘ trovos indan lokon flanke de l' ‚Fundamenta Krestomatio‘. Ambaŭ havas apartajn kvalitojn, sed la novnaskita meritas apudesti sian neanstataŭeblan antaŭulon.“
Esperanto (1922, Nr. 11).

INTERNACIA KANTARO

16 a — 20 a milo

TEKSTARO. 1929. 101 PAĜOJ. PREZO: RM 1.50

MUZIKA ELDONO. 1930. 164 PAĜOJ. PREZO: RM 4.—

Enhavo: 139 popolaj kantoj el 55 landoj, 7 esperantaj kantoj, rondkantoj kaj kantsalutoj, 3 famaj koncertarioj.

„... La enhavo de la kantaro plene pravigas la titolon ‚internacia‘. En la kantoj alfabeto laŭ landoj ordigitaj oni trovas neelĉerpeblan fonton da ĝuo kaj ĝojo. Ili estas facile kanteblaj pro la flua stilo kaj plena akordiĝo kun la zorgeme aranĝitaj kaj tre bone kompostitaj kaj klare presitaj melodioj; la plej multaj estas unuvoĉaj, kelkaj plurvoĉaj, tiel ke oni povas elekti en kantemaj rondoj aŭ ĉe festaj okazoj laŭ bezono kaj deziro. Ankaŭ kelkaj malofte aŭditaj aŭ aŭdeblaj specialaĵoj agrable surprizas.“

